

THE BRITISH ESPERANTIST

WITH WHICH IS INCORPORATED

INTERNATIONAL LANGUAGE

VOL. XXX, No. 363.

JULY, 1935.

THE BRITISH ESPERANTIST.

Publishers (Eldonistoj) :

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION,
142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

Telephone : HOLBORN 4794.

Editor (Redaktisto) :

MONTAGU C. BUTLER,
36 PENRHYN ROAD, KINGSTON-ON-THAMES, SURREY.

Telephone : KINGSTON 1484.

RATES OF SUBSCRIPTION (including postage to any part of the world)—Twelve months, 2/6. Single copies, Three Penny Stamps. (Free to B.E.A. members).

ADVERTISEMENT RATES will be quoted on application to the Secretary of the B.E.A.

JARABONO : 3 svisaj frankoj. Unuopaj ekzempleroj : po 30 centimoj (aŭ unu respondkupono). Oni sendu manuskriptojn al la Redaktisto. La Redaktisto resendos nur tiujn manuskriptojn, kiujn akompanos afrankita koverto, aŭ respondkupono. Li rezervas la rajton fari korektojn laŭbezone.

MANUSCRIPTS should be typewritten, and be addressed to THE EDITOR. Although care will be taken to return rejected manuscripts, the Editor does not hold himself responsible for loss or damage, nor does he undertake to return manuscripts unaccompanied by a stamped addressed envelope. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned. Matter should be received by the 8th of the month.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION consists of Fellows, Members, Affiliated Groups, and Federations. The Annual Subscriptions are :—Fellows, 21/-; Members, 5/-; Junior Members (under 18), 2/6; Life Fellowship, £12. 12s. 0d.; Life Membership, £5. (See prospectus).

NIA KONGRESO

La 26-a Brita Kongreso okazis je Pentekosto, Junio 7-11, en Southend-on-Sea. Mallonge, oni povas diri, ke ĉio bone iris. La vetero estis sufiĉe bela, kaj ĉiu programero okazis sen ia ajn malgataĵo. La kongresejo estis la Palaca Hotelo : palacaj estis ja la ĉambroj, kaj luksa ĉiu aranĝo.

La marbordo ĉe Southend je Pentekosto estas eble la malplej loga loko en Britujo ; sed en la paca rifuĝejo provizita de la Kongresejo oni povis feliĉe forgesi la odoron litoren-kardi-bukcen-vinagran kiu tiutempe karakterizas la urban fronton, la paperondaĉojn dissternitajn de la ekskursistoj, kaj la kriadon de la ostro-kornet-rok-vendistoj. La faktoj, ke preskaŭ ĉio okazis en unu sama konstruaĵo, kaj ke tie ankaŭ loĝis granda parto de la 250 kongresanoj, tre helpis al la kontentiga funkciado de la kongresaferoj, kaj certe ankaŭ multe kreskigis la familian senton interne de la kongresanaro. Enirinte la kongresejon, oni unue admiris la belegan ĉambron disponigitan al la membroj kiel akceptejon kaj legejon. Poste oni rimarkis la librobudon prizorgitan de Thompson's el Southend, sufiĉe bone patronatan ; ankaŭ ekspozicion de laboro farita de infanoj lernantaj Esperanton en diversaj lernejoj ; ekspozicion mirinde elokventan pri la eblaĵoj de Esperanta instruado, kiu meritis iom pli da atento ol ĝi ŝajne ricevis, kaj por kiu oni devas tre danki al F-ino Nixon, kaj al ĉiu lernejo kiu sendis kontribuojn.

La kongreslibro estis presita tute en Esperanto—eĉ la reklamoj : afero tre kontentiga, kaj imitenda de estontaj kongreskomitatoj. Notinde estis, ankaŭ, ke en la nuna kongreso oni aŭdis multe pli la sonojn de Esperanta konversacio ; oni multe pli spiris la aeron de Esperantujo,

ol kelkafoje okazis en antaŭaj kongresoj. Pri tio ankaŭ ni devas danki al la instigo kaj la ekzemplo de la kongresa komitato: ĝi estas afero tre grava por la sana vivo de la movado.

Ĉiu kongresano alirba ricevis senpagan uzon de tramoj, omnibusoj, piero, pierfervojo, naĝejoj, tenisejoj, golfejoj, sidejoj: fakte, ĉio farebla estis farita por la komforto de la vizitanto. Kelkaj kongresanoj loĝis tendare: por la ceteraj oni trovis konvenan loĝejon.

Pri la aranĝoj de la tuta kongreso mi aŭdis nenian plendon ajn, krom pri la ludado de *La Espero* en iu kunveno laŭ galopa rapideco, kiu ne ebligis eĉ spiradon por ĝin kanti, kaj tute detruis la spiriton de la kanto. Afero bagatela!

Ni aldonu ke al ĉiu kongresano la korporacio donacis dikan gvidlibron, kiu parenteze enhavis paĝon en Esperanto.

Alia interesa trajto de la kongreso estis la ĉeesto de alilandaj samideanoj, inter kiuj estis 3 japanoj, 3 holandanoj, franco, kaj polo.

VENDREDO, JUNIO 7

Vespere okazis *Interkoniĝa Vespere*, kun vere gaja programo. Solkantis en Esperanto S-ino Kennedy, orkestreto ludis sub direkto de S-ino Ritchie, F-ino Howes prezentis muzikajn monologojn, S-ro Taylor mirinde biciklis, kaj lernantoj de F-ino kaj S-ro Coggin prezentis kabaredon. Eble la ĉefa ero estis scienca disertacio de S-ro D. P. Boatman pri *La Insultarto en Esperanto*. Reznigante pri instruado de blasfemiaĵoj, li instruis la principojn de simpla insultado uzebla ekster la armeo, kaj finis per riĉa kolekto da esprimoj konvenaj por la ordinara vivo. Zorga aŭskultado en la postaj tagoj, tamen, evidentigis, ke la kongresanoj malmulte profitis el tiu leciono.

SABATO, JUNIO 8

Jarkunveno de la B.E.A.—Ĉeestis proksimume 90. Oni ricevis salutojn de organizaĵoj en Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Egiptujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Nederlando, Polujo, kaj Rumanujo. Salutleterojn sendis ankaŭ Prof. Collinson, S-ro W. Harvey, kaj S-ro John Merchant. Sekvas la oficiala raporto.

The Annual Report and Accounts were duly passed, and as no ballot had been necessary, the following officers for the year 1935-36 were declared elected:—

President - P. L. WRIGHT.
Vice-Presidents - J. J. BOUTWOOD, J.P., F.B.E.A.
 Prof. W. E. COLLINSON,
 M.A., Ph.D.
 E. ROSSLYN MITCHELL,
 M.A., LL.B., J.P.

Hon. Secretary - BERNARD LONG, B.A.
Hon. Treasurer - W. A. GETHING, F.B.E.A.
Councillors - Rev. W. DOWNES, M.A., B.D.
 Miss V. C. NIXON, B.A.
 Miss E. RICHARDSON,
 R. ROBERTSON, F.B.E.A.
 Mr. G. H. COATES, F.C.I.S., F.A.A., was re-elected Auditor.

No invitation had been received for the 1936 Annual General Meeting, and the matter was left in the hands of the Executive Committee. Swanwick was suggested, and an announcement will be made as soon as a decision has been reached.

The main item for discussion was the question of the advisability of founding an *Esperanto-Domo* in this country. On this point there was a long discussion, but only on points of detail did there appear to be appreciable difference of opinion. Finally the following resolution was carried unanimously:

"That this Annual General Meeting authorizes the immediate launching of an appeal for a fund to be known as the Esperanto Jubilee Fund.

"That the main object of this Fund be the acquisition of a freehold or long leasehold property in the London area for use as an *Esperanto-Domo*; this building to house the offices and library of the Association, to provide quarters for Council Meetings and other official gatherings, and to cater for visitors and for social purposes.

"That in view of the fact that the actual type of building and site would depend on the sum raised, the Council shall report the position to the Annual General Meeting in 1937, and shall make recommendations to that Meeting in accordance with the success of the Fund and the type of property then available at a suitable price.

"Should the sum necessary for the purchase of a suitable property not be obtained before the date of the Annual General Meeting, 1937, the Council shall report the position to that meeting, and, if the Council deems it desirable, it shall place before the meeting for approval an alternative plan for the use of the Fund for the renting and equipment of permanent quarters worthy of the Association and affording the facilities mentioned above.

"That all money and promises be collected subject to the foregoing proviso, and donors be so informed."

The President then appealed for donations and promises to inaugurate the Fund. There was an excellent response, the sum raised being £230. 13s. 6d. Attention was drawn to the facts that a generous supporter

had promised to double all amounts received during the first three months after the launching of the appeal, up to a maximum of £300; and that Mrs. Jeffery had promised to give £200 to the Fund (in memory of her father, the late Mr. F. J. Strong) as soon as £800 had been collected (see also page 124).

Esperanto en la Praktiko.—Sub ĉi tiu titolo, je 3.0, okazis kunveno prezidata de *S-ro J. J. Boutwood, J.P.*, kiu montris la praktikan utilon de internacia lingvo universale komprenata.

S-ro D. P. Boatman deklamis la jenan originalan poemon:

FOR LA BAROJN!

Disbatu la murojn inter la landoj!
Ŝtatoj ne estas rabobandoj.
Forigu la ekonomiajn barojn!
Lasu liberaj homojn kaj varojn!

Disbatu la murojn inter la klasoj!
Riĉularo kaj homamasoj
Vole-nevole fratoj estas—
Spite malamon, fratoj restas.

Disbatu la murojn inter la kredoj!
Fido kaj amo ne estas rimedoj
De sekto aparta, kaŝe mistera:
Dia kompato ja estas libera.

For la barojn inter la homoj!
Amo regu en ĉiuj domoj!
Homo kun homo kunlaboru!
Paca kulturo kresku kaj floru!

S-ro Georges Warnier, Prezidinto de la Pariza Rotaria Klubo, diris, ke anstataŭ paroli pri la temo, li prefere faros averton kontraŭ la troa prediko pri la utilisma flanko de nia movado. Li tre elokvente legis la pli grandan parton de la parolado de Zamenhof en la Ĝeneva Kongreso, en kiu Zamenhof priskribis la signifon kaj gravecon de la interna ideo de nia lingvo, kaj finis per la flamaj kaj neforgeseblaj vortoj "Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!"

La inspiraj vortoj de nia Majstro sendube trovis revibron en multaj koroj, kaj ni tre dankas al *S-ro Warnier* pro lia ĝustatempa memorigo pri la esenco de nia movado, tro ofte ne atentata. Li poste liveris detalojn pri lastatempa progreso de Esperanto en Francujo, kaj citis inter aliaj la fakton, ke la firmo *Bon Marche* nun donas rabaton de 5% al ĉiu membro de U.E.A. Li atentigis pri la grava influo de radia propagando, kaj konsilis, ke ni faru nian eblon labori sur tiu kampo. Programo kun muziko, ekz., tiuj de Brno, estas pli efika, ol simpla kurso aŭ turisma reklamado.

F-ino T. Putto, el Arnhem, diris, ke ŝia lando estas malgranda, tamen havas grandajn rilatojn. En la lernejoj la infanoj devas lerni tri fremdajn lingvojn. Pro tio, la neceso por Esperanto estas tre evidenta, kaj nia lingvo tie faras bonan progreson, ne nur ĉe popolaj kaj laboristaj institucioj, sed ankaŭ en la rondoj oficialaj. En multaj stacidomoj nun staras tabulo kun la adreso de la loka UEA Delegito, kaj en la poŝt-oficejoj oni ofte vidas avizon "Esperanto parolata." La ekzisto kaj prospero de la Cseh-Instituto estas plua montrilo, ke Esperanta bone vivas en Nederlando.

S-ro P. L. Wright diris, ke la elokventaj paroladoj de niaj alilandaj gastoj liveris pluan ekzemplon de la vivanteco de nia lingvo. Efektive, kiel internacia lingvo Esperanto estas pli vivanta, ol iu ajn lingvo nacia. En nia lando la pasinta jaro estis unu de agemo kaj progreso; komuna laboro por komuna celo donis al ni mirindan senton de unueco.

La Kongresa Balo.—Ĉu ekzistas membro, kiu, pensante pri okazonta kongreso, ne pensas almenaŭ iomete pri la balo, kaj antaŭĝuas ĝin anticipe? Pri la Balo en Southend oni devas konfesi, ke la realaĵo estis eĉ pli bela, ol la revo. La aranĝintoj sendube sin sentas bone rekompencitaj per la plena sukceso de la vespero, kaj la ĝuo kaj feliĉo kiuj videble regis dum la tutan vespero.

En la Blanka Ĉambro la Urbestro (Urbkonsilanto A. T. Edwards, J.P.) kaj lia ĉarma Sinjorino (*F-ino Edwards*) akceptis la kongresanojn. Kiel bela ŝi aspektis en sia delikata helblua robo! Poste ĉiuj eniris la balĉambron, kie, post speciala bonveniga parolado de la Urbestro kaj dankrespondo de nia Prezidanto, multe tro rapide forpasis la horoj. La bonega planko, la ĝuplenaj dancoj, la lerta kaj bonakorda muzikistaro, la infan-kantetoj, la ĉeesto de la urbestro, kaj la krio "Ni kantu al ili Esperante!": ĉio kontribuis al la feliĉo, kaj al la sento, ke oni vere ĝuas la bonvenigon al la urbo. Ni ne forgesu ankaŭ la okazojn por pli bona interkoniĝo kun la novaj amikoj jam gajnitaj dum la tago, kaj la senton de internacieco kiu sekvis el la ĉeesto de niaj alilandaj vizitantoj. Fine de la programo oni laŭte hurais danke al la urbestro kaj al ĉiuj, kiuj kunlaboris por la sukceso de la festo.

DIMANĈO, JUNIO 9

Enlanda Propagando.—Je 10.0 okazis kunveno de Delegitoj kaj Oficistoj de la

B.E.A., por priparoli propagandajn problemojn. Prezidis S-ro B. Long. Estis nenia tagordo, sed oni interŝanĝis helpajn ideojn.

Iu plendis, ke ne okazas sufiĉe da propagandaj kunvenoj. Alia respondis, ke la publiko ofte ne ĉeestas kunvenojn aranĝitajn.

W. A. Gething : Se la publiko ne volas veni al niaj kunvenoj, ni povas iri al iliaj. Multaj societoj volonte akceptus parolanton, kaj tiumaniere ni akiras novan sangon. La plej efika propaganda kunveno estas tiu, en kiu parolas Esperante iu alilanda Esperantisto, tradukata de loka samideano. Oni utiligu la parencojn : la edzino povas prepari refreŝaĵojn, dum la edzo prelegas ! Mia filino interesis lernejan kunulinon, kiu deziris lerni kun ŝi, kaj tiu venigis propran amikinin. Nun estas ses knabinoj en entuziasma kurso, kiu komencas altiri la atenton de la loka lernejo. Oni ankaŭ provu enigi korespondan kurson en lokan ĵurnalon.

C. C. Goldsmith rakontis pri du sukcesaj propagandaj kunvenoj, al kiuj la publiko venis tute multnombre. Kaŭzo de tio estis, ke ĉiu loka Esperantisto invitis siajn amikojn per persona letero. Li atentigis ankaŭ pri la utileco de konstanta grupraporto en la loka gazetaro : tia, kian regule atingas la grupoj en Oldham, Portsmouth, kaj North London.

B. Long : Se ĵurnala reklamado montriĝas senefika, oni tamen povas ofte trafi bonan rezulton per okaza letero (oni evitu, ke ĝi estu rekta reklamo). Enketo en la Londona Klubo montris, ke ĝia membraro eniris la movadon per tre multaj vojoj—eĉ la plej neverŝajnaj ; oni do provu ĉiun metodon, kaj neniun malŝatu.

W. Brown atentigis pri la graveco de la Virinaj Institutoj. La movado kreskas per la laboro de individuoj : ni kaptu la individuojn.

F-ino Davey : Oni ne supozu, ke la solaj personoj kun kapablo paroladi troviĝas en Londono. Ĉiu grupo havas kapablulojn : ili nur trovu la kuraĝon kaj la energion. Subĉiela propagando estas ĉiam tre efika.

M. C. Butler : Oni memori, ke la servoj de la B.E.A. aŭtomobilo estas je la dispono de lokaj grupoj, kiuj bezonas helpon. Tre dezirinde estas, ke la grupoj klopodu havigi inviton el lokaj lernejoj por Esperanta provleciono : tiucele ni volonte helpus per provizo de taŭga literaturo. Por havigi aŭskultantojn ĉe parolado subĉiela necesas nur tri aferoj : barelo ; unu amiko, kiu parolas laŭte *kaj flue* en Esperanto ; kaj alia, kiu egale flue tradukas anglan : la aŭskultantoj nepre amasiĝos. Sed balbuta parolado efikas malpropagande.

B. E. Long : Ekzistas tri specoj de grupoj : (a) *la Propaganda grupo* ; (b) *la Studrondo* (eble nur efemera kaj neformala, sed tre necesa) ; kaj (c) *La Faka Grupo*, kiu uzas la lingvon por aferoj de komuna intereso. Oni ne postulu, ke ĉiu Esperantisto partoprenu en ĉiuspeca agado.

Parolis ankaŭ F-ino Nixon, S-roj Jayne, Oliver, Parker.

Kongresa Fotografo. Je 12.0 la kongresanaro fotografiĝis de Ray Studios, Ltd., High Street, Braintree, Essex. Oni povas ricevi ekzempleron por 2ŝ., aŭfrankite, skribante al tiu adreso.

La Kongresa Diservo okazis je 3.0 en Crowstone Kongregacia Preĝejo. La Ordo de Diservo troviĝis en la Kongresa Libro, kaj estis tre simpla kaj konvena. Oni kantis kvin himnojn prenitajn el *Himnaro Esperanta* (tiun informon oni akcidente forgesis presigi). La Biblian Legaĵon legis Pastro A. A. Lee, la loka pastro. Solkantis tre bele F-ino Grace Vyvienne (*Largo*, Handel ; *Morto kaj la Junulino*, Schubert). La monkolokto estis por la Blindula Kaso. Ĉeestis verŝajne 250.

La Diservon kondukis Pastro W. J. Downes, M.A., B.D., el Tonbridge, pri la teksto "*Kaj el unu origino li faris ĉiujn naciojn de la tero* (Agoj 17, 26). Ĉie oni trovas samtempe unuecon kaj diversecon. Unu grava homa problemo estas konservi la unuecon en la diverseco kaj la diversecon en la unueco. Ĉe la mondo fizika oni ja trovas perfektan unuecon en senlima diverseco. Sed ĉe la homaro tio estas ankoraŭ idealo alstrebenda, sed ne realigita. Korpe kaj mense ni estas fundamente similaj, sed per siaj diferencoj la homaro prezentas la aspekton de kirlanta, sovaĝa, brueganta ĥaoso. Same ĉe la kampo spirita kaj religia, ni vidas mankon de unueco, kiu starigas obstinajn barojn inter popoloj kaj inter individuoj. Iugrade niaj diferencoj estas benefikaj : ili gardas nin kontraŭ monotoneco, kaj helpas al la disvolviĝo de nia personeco. Sed se ili preterpasas la limon de sia utilo kaj vera signifo ili distordas la aranĝon de Dio, kaj la puno nepre sekvas : malĝojo, malpaco, kaj sufero. Jam tempas, insiste akcenti la fundamentan unuecon de la tuta homaro. "El unu origino Dio faris ĉiujn naciojn." La vera unueco venas nur el rekono de la fakto, ke la homa naturo estas spirita. Nur el tio konsistas la vera unueco de la homoj : nur pro tio povas efektiviĝi la granda Kristana mondidealo, la Regno de Dio. Materialaj posedaĵoj estas limigitaj : la gajno de unu ofte signifas la perdon de alia.

Sed ĉiuj homoj povas egale partopreni en la bono, la vero, la saĝo.

Ankaŭ de nia movado la viviga fundamento estas spirita. Ni restas "granda familio." Se ni mortigus la internan ideon de nia lingvo, ni malstreĉus la risorton de la Esperanta vivo.

Oni ja vizitas preĝejon por adori Dion, ne por admiri la elokventon de la Diserva kondukanto. Tamen oni ne povas ne danki al Pastro Downes pro unu el la plej inspiraj paroladoj, kiujn ni iam ajn aŭdis en Esperanto, kun bedaŭro, ke ne estas eble en kelkaj linioj ĉi tie reprodukti la impreson, kiun ĝi faris sur la aŭskultantojn.

La Romkatolikaj Kongresanoj en la vespero okazigis kunvenon en la Paroĥa Halo de la Preĝejo de la Sankta Koro. Ĝi estis tre sukcesa, kaj 15 interesatoj donis sian nomon kaj adreson, por ricevi informojn pri la Grupo en Southend.

Orienta Federacio.—Post temanĝo en la Hotelo kunvenis 34 membroj kaj amikoj de la Federacio por aferkunveno. Oni elektis oficistojn por la venonta jaro. Kun granda plezuro oni konstatis, ke la Federacio ankoraŭ staras ĉe la supro rilate la Trijaran Planon, kvankam Yorkshire preskaŭ ĝin egalas. La venonta konferenco okazos je 5 Oktobro en East Ham.

Pli malfrue **Orkestro** sur la Klifoj ludis la Esperantistan Himnon.

Je 9.30 F-ino G. H. Moxon, M.A., faris tre interesan paroladon pri **Vojaĝo tra Italujo**, ilustritan per multaj belaj lumbildoj, kiuj montris tre efike la grandiozajn vidindaĵojn kaj la mirindan pejzaĝaron de tiu bela lando. Je la fino, responde al unuanima peto, F-ino Moxon montris ankoraŭ pluajn bildojn, pricipre pri Venecio. La bildoj kaj aparte la bela parolado de F-ino Moxon estis videble tre ĝuataj, kaj espereble decidigos ankoraŭ pluajn viziti la Kongreson en Romo.

LUNDO, 10 JUNIO

Ekskurso. Oni luis kvar luksajn aŭtobusojn por veturigi cent kongresanojn norden ĝis la limoj de la provinco, vizitante diversajn interesajn vidindaĵojn survoje. Ĉe Beeleigh Abatejo, nun privata loĝejo, la posedanto rakontis la historion de la konstruaĵo, kaj montris diversajn antikvaĵojn. En Kolĉestro oni ĝuis bonan manĝon, kaj ricevis viziton de nia malnova amiko S-ro Barnes. Oni unuanime tostis la sanon de Ges. Blaise, kiuj tiutage festis la 25-jaran revenon de sia edziĝtago. S-ro Blaise, respondante, rimarkigis, kiom pli bone estus, se ĉiu Esperantisto, kiel li, elektus Esperantistinon kiel vivkunulinon.

Poste oni vizitis la kastelon kaj la muzeon. De tie oni vagadis al la vilaĝo Flatford, kaj vidis en kabano la vilaĝan sonorilaron, kiu kutime troviĝas en la preĝeja turo. Ni devis halti ĉe Flatford Muelejo (fama pro pentraĵo de Constable); sed, duan fojon perdinte la vojon, ni troviĝis anstataŭe en Ipswich. De tie ni rapide revenis al Southend, laŭ Kelvedon, Witham, Chelmsford, Battlesbridge kaj Rayleigh.

Samtage unu malfeliĉa kaj kuraĝa kandidato sidis sola en fermita ĉambro, provante la ekzamenon por la Licenciata Diplomo.

Amuza Vespere. Vespere en la Balĉambro oni ĝuis festan kunvenon, kiu tre sukcesis. Prezidis S-ro R. A. Croston. Tre helpis presita programo de vortoj, dank' al kiu oni kunkantis *La Insulo Kapri* (F-ino Ritchie), *La Fluga Trapez'* (S-ro Croston), kaj aliajn melodiojn; okazis ankaŭ orkestra muziko kaj dancado. La ĉefa programero estis prezento de *Jes, Panjo!* unuakta komedio verkita de Douglan P. Boatman (kiun kelkaj jam ĝuis, legante ĝin en *Heroldo de Esperanto*), en kiu bonege rolis la aŭtoro, S-ino kaj S-reto Boatman, F-inoj G. Moxon, G. Middleton, kaj M. Fletcher, kaj S-ro K. McLaren, reĝisorate de S-ro D. M. Read, A.L.C.M. En la fino la aŭtoro ricevis ovacion, kaj nome de la alilandaj vizitantoj oni donacis bukedojn al la sinjorinoj kaj historian volumon de la gazeto *The Esperantist* al S-ro Boatman.

MARDO, 11 JUNIO

Edukada Kunveno okazis je 10.0. Ĉeestis preskaŭ 100. S-ro Boutwood, kiu prezidis, uzis la okazon rekomendi la libron *Esperanto for Beginners*, kiun en ĝia nova formo li trovis bonega propagandilo.

S-ro P. L. Wright, sub la nomo *Persi Pravo*, faris specimenan lecionon laŭ la Cseh-metodo, kaj montris, kiel oni povas per tiu metodo konversacie kaj ŝerce, tamen serioze, instrui la elementojn de la lingvo.

F-ino Edwards (Bishop Auckland) malfermis diskuton pri instrumetodoj. Ŝi mallonge preparolis sian uzon de la Cseh-metodo kune kun la legolibro *Esperanto por Infanoj*. Ŝi ankaŭ citis el tezo verkita de studento en la Universitato de Durham pri la temo *Esperanto kiel lernobazo por la Franca Lingvo*. Ĉeestinte Esperantan kurson por 11-jaraj lernantinoj, li aparte notis la spiriton de la leciono, kiun li trovis ĉiam vigla kaj ĝojplena. Tiu fakto estas atentinda, ĝar estas necese, dum lingvolernado, havigi bonvolan sintenon ĉe la lernantoj.

Sekvis ĝenerala diskuto pri instrumetodoj, daŭrigo de intereso inter junaj lernantoj, kaj la sinteno de edukaj aŭtoritatoj.

F-ino Nixon trovis la Cseh-metodon bonega, sed en lerneja kurso spertis la neceson suplementi ĝin per iom da lernolibra studo, por liveri al la lernantoj resuman regularon kaj ekzercadon.

M. C. Butler atentigis, ke laŭdante la nedubeble grandajn meritojn de la Cseh-metodo, oni tamen ne supozu, ke ĝi estas necese kaj ĉiam la plej bona. Oni devas elekti unu aŭ alian metodon laŭ la limigoj la la kurso, la bezonoj kaj la speco de lernantoj, kaj aliaj faktoroj. Ne ekzistas unu sola metodo, kiu estas "la plej bona" en ĉiuj cirkonstancoj. Cetere, oni memoru, ke kvankam la Cseh-metodo majstre faras la malfacilan taskon malfermi la buŝojn, ĝi tamen estas nur enkonduko al la plena majstreco de la lingvo, kaj ke poste oni devas instigi la lernintojn al legado de bona literaturo kaj al serioza studo de fidinda lernolibro. Alie oni povos ricevi rezulton nekontentigan, pri kiu kulpos ne la metodo, sed la uzantoj.

Al la sekretario, S-ro A. C. Brown, al la tuta loka komitato, kaj al ĉiu en la loka grupo aŭ aliloke, kiu iumaniere kontribuis al la aranĝoj kaj laboro por la kongreso, sinceran dankon kaj koran gratulon pri ĝia plena sukceso.

LA SKOTA KONGRESO

La 30-a Skota Kongreso okazis en la hotelo Grand Marine, Rothesay, 17-20 Majo. Ĉeestis 88 samideanoj ne nur el Skotlando kaj Anglujo, sed ankaŭ el Kanado kaj Fiĝio. Pro la bedaŭrinda sed neevitebla foresto de la Prezidanto S-ro G. D. Buchanan, prezidis—kaj admirinde—S-ino C. B. Stewart el Glasgovo.

Vendredon vespere *F-ino J. Caw* parolis pri la temo "Esperanto en la Hejmo," kaj S-ro J. P. W. Murray pri "Esperanto ekster la Hejmo." Oni kantis *Rothesay Bay* en bela traduko de S-ro W. Harvey.

Sabaton vespere la Provosto kaj la Magistrato faris Civitan Akcepton al la kongreso. Sekvis Festeno kaj Danco. Konsilanto Roslyn Mitchell respondis al la tosto "La Memoro de Zamenhof," kaj akcentis la gravecon de Esperanto por internacia paco kaj bonvolo kiel sekvo el interkompreno.

Responde je la tosto "La Reĝa Urbo Rothesay" respondis Provosto Thomson, kaj S-ro Munro, Rektoro de la loka

Akademio (en kiu S-ino Simons el Edinburgh faris du provlecionojn dum la semajno) respondis la toston "Esperanto kaj Edukado."

Dimanĉe okazis la Kongresa Diservo en New Rothesay preĝejo. La predikanto, Pastro John Beveridge, M.B.E., B.D., alparolante la infanojn, montris la valoron de vivo altruista laŭ la ekzemplo de Zamenhof; en la kongresa prediko li parolis pri la interna ideo de la movado. La Malnovtestamentan legaĵon legis S-ro Roslyn Mitchell; la Novtestamentan S-ro William Harvey. Oni kolektis £4. 10s. 0d. por *Ligilo*.

Vespere, sub la prezido de S-ro William Harvey, I.S.O., oni diskutis la temon "Kiel Gajni Skotlandon por Esperanto." Ni esperas, ke tiu diskuto portos bonan frukton.

En la fina kunveno, lunde, oni elektis S-ron David Tullo, S.S.C., el Edinburgo, la Federacia Prezidanto. La venonta kongreso okazos en Callander, en Majo, 1936.

Al S-ro Robert Stewart la kongresa sekretario, kaj al ĉiu helpanto, oni ŝuldas koran dankon kaj gratulon.

Guide-books in Esperanto.—Every month we have to report the issue of new booklets issued in Esperanto for publicity purposes by various towns. This month we have received an eight-page booklet about the town of Košice in Czechoslovakia (no address of publisher); a six-page folder describing the Swiss Alpine Post and its arrangements for travel by postal motor-car: "Svislando: Alpa Poŝtaro," from *Svisa Centra Oficejo de Turismo, 9 Bahnhofplatz Zürich*; a large sheet giving full details of twenty Holiday Centres and Spas in Slovenia, "Signifaj Kuraclokoj" (*Asocio por Fremdultrafiko en Slovenio, Vojaĝoficejo Putnik, Kreditna Banka, Ljubljana, Jugoslavujo*); and a beautiful twenty-page booklet describing the city of Groningen, with a large sheet map and numerous illustrations (*Societo por Fremdultrafiko, Groningen, Nederlando*).

Korektoj al antaŭa numero (estis neeble plene kontroli la provaĵon): P. 98, l. 23, *Kolombo* d.e. *Kolumbo*; p. 99, l. 2 kaj 7, forstreku *strok, trubador*; l. 33, 349 d.e. 348h; l. 55, *senpele* d.e. *trapele*; l. 2 de ms. 244d d.e. 253a; (*dua kolumno*) l. 6, 115b d.e. 115g; l. 16, *gutoj* d.e. *guto*; l. 36, *el* d.e. *ĉe*; l. 6 de ms., *tavolo*; l. 3 de ms., forstreku frazon 474f; p. 100, lasta linio, 32d d.e. 32a; p. 101, l. 9, 115a d.e. 155a; l. 11, legu *klavoj* (*klapoj*), kaj aldonu 136c. La vorto *fabriko* estas Zamenhofs.

Ĉe p. 107, l. 26, anst. *Arbusto* legu *Arbeto* (en la difino).

SOMETHING NEW UNDER THE SUN.

We have pleasure in introducing a most fascinating novelty in our Empire Madeira-style Wine. Madeira may be termed the Emperor of Wines and is a most satisfactory and health-giving beverage for domestic use. This wine has been approved by the considered judgment of a select group of connoisseurs to whom it was submitted and we now offer it to the Esperantistaro with complete confidence.

Thanks to the Imperial Preferential Tariff, we can deliver this wine, carriage paid home, at the moderate price of 48/- per doz. Cash with Order. Unfortunately, the available quantity is somewhat limited so that orders should be placed early to prevent disappointment.

BUCHANAN, SCOTT & Co.,
GARTH STREET, GLASGOW, C1.

YOU WILL LEARN


Esperanto more thoroughly and more quickly if your scheme of study is based on one of the

Standard Correspondence Courses

There are three courses :
Preliminary, Advanced, Translation,
and a prospectus of any will be sent
free on request.



BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION
142, High Holborn, London, W.C.1.



The famous Bathing Pool at St. Leonards.

HAVE **YOU** WRITTEN
YET FOR YOUR COPY
OF THE DELIGHTFUL
HASTINGS
& **ST. LEONARDS**
GUIDE FOR 1935?

IF NOT, fill in your name
and address below and post
(½d. stamp) to the Information
Bureau, Hastings.

Name

Address

..... (B.E.A.)



On the delightful Hastings Cliffs.

OUR OWN HOME

As will be seen from the account of the Annual Meeting held at Southend, it has been decided to go ahead with the part of the Three-Year Plan, which envisages the establishment of an *Esperanto-Domo* in this country. The proposal was enthusiastically received, a sum of no less than £230 being promised at the meeting. As all donations received during the first three months (to a maximum of £300) will be doubled by a generous supporter, and as we have another promise of £200 as soon as £800 has been raised, it ought not to be long before the first £1,000 is in hand.

The amounts so given or promised range from £100 downwards, and a cordial invitation to support this generous lead is hereby given to those who were unable to be at the meeting. If, during a meeting at which about 80 people were present £230 can be raised so promptly and with such enthusiasm, what have we a right to expect from the first appeal to our whole membership?

We confidently appeal to our members to send immediately such an avalanche of contributions—large and small—as will immensely surpass all previous achievements of our Association in the raising of funds for our work. It should even be possible—as suggested by a member present at the meeting—that our Jubilee Year should mark, not the end of the campaign, but the actual opening of the *Domo*.

The actual type of building, and its position, will depend on the final amount raised. It is believed that a suitable building, in a suburb of London easily accessible from the centre, will be obtainable for £2,500. Many speakers at the Annual General Meeting stressed the advisability of having the *Domo* as near as practicable to the centre of London, and to obtain one there would cost about £4,000. The decision will be made at the Annual General Meeting in 1937, and the response of our supporters before that date will show what is possible.

It is realised, however, that hundreds of our supporters cannot help in this manner. It is suggested that many of these would like to help the scheme by enrolling as "Esperanto-Builders." To each builder will be sent a card on which there are spaces for 40 sixpenny postage stamps. Each undertakes to place on the card at least one stamp weekly. When the card is full it should be sent to the B.E.A., and the 20/- so collected will be applied as follows:—

9/- to cover B.E.A. membership with year-book, and 10/- to the Jubilee Fund, but this allocation can be varied in accordance with special desires. The balance of 1/- is the Post Office charge for cashing the stamps. We hope to enrol at least 500 Builders, and if you are willing to be one, please send a postcard to the B.E.A. Secretary, and a card will be sent to you at once. The first list of Esperanto-Builders will be given in our next issue.

Federations, Groups, and individuals can also help by arranging social events in aid of the Fund, and it is believed that a considerable sum might be raised in this way from non-Esperantists.

Finally, it should be added that the following quotas for the Jubilee Fund have been allotted to Federation areas, in accordance with paragraph 2 of the Rules governing the Silver Cup Competition, given in the May issue of *The British Esperantist*.

DOMO.—QUOTAS FOR 1935.

	£
Bristol and Somerset Federation ..	25
Eastern Federation	50
East Midland Federation	50
Lancashire and Cheshire Federation	60
Northants Federation	15
North-Eastern Federation	25
Scottish Federation	60
South-Eastern Federation	50
Southern Federation	40
South-Midland Federation	50
South Wales and Mon. Federation ..	25
South-Western Federation	20
West-Midland Federation	60
Yorkshire Federation	60
London Postal District	100
Remainder of Gt. Britain and Ireland	40
Overseas	20

The positions in the Cup Competition at the end of May are given in the table on the next page.

B.E.A. Finances.—The figures to the end of May are:—


	To May 31, 1935			To May 31, 1934		
	£	s.	d.	£	s.	d.
General Expenditure ..	548	4	1	490	5	11
Net cost of "B.E." ..	78	0	0	55	19	8
Subscriptions (Gross) ..	751	17	9	699	18	11
Do. (Paid to UEA) ..	273	19	10	289	0	11
Do. (BEA portion) ..	477	17	11	410	18	0
Affiliation Fees	18	5	0	20	6	6
Donations	45	15	5	40	3	4
Correspondence Courses	15	8	9	4	18	4
Sales	505	17	6	505	14	8
Motor Car Expenses ..	63	19	3	61	15	9
Motor Car & Propaganda Fd	41	10	3	54	17	4

	QUOTA.				OBTAINED.				%
	M.	F.	G.	P.	M.	F.	G.	P.	
1. Eastern Federation	100	300	2	840	45	107	1	352	41.90
2. Yorkshire Federation	90	600	3	1110	52	158	1	438	39.46
3. East Midland Federation	50	300	2	590	20	35	2	175	29.66
4. Bristol and Somerset Federation	20	150	1	270	13	9	—	74	27.49
5. Southern Federation	35	250	2	465	8	36	2	116	24.94
6. South Wales and Mon. Federation	20	150	1	270	10	14	—	64	23.70
7. North-Eastern Federation	30	250	2	440	13	35	—	100	22.77
8. South Midland Federation	45	250	2	515	13	24	1	109	21.16
9. London Postal District	200	1050	2	2090	60	142	—	442	21.14
10. Lancashire and Cheshire Federation	100	800	4	1380	46	56	—	286	20.73
11. West Midland Federation	90	650	3	1160	27	65	—	200	17.24
12. South-Eastern Federation	95	650	3	1185	25	77	—	202	17.04
13. Scottish Federation	90	700	3	1210	25	14	1	159	13.14
14. Overseas	48	250	1	510	13	—	—	65	12.74
15. Northamptonshire Federation	6	50	1	100	2	1	—	11	11.00
16. South-Western Federation	10	100	1	170	1	3	—	8	4.71
17. Remainder of Great Britain and Ireland	50	1000	2	1290	9	14	—	59	4.57
Total	1079	7500	35	13595	382	790	8	2860	
Percentage of Total									21.04

M = New Member of B.E.A.
G = New Group.

F = Friend of Esperanto.
P = Points.

The next list will show the positions on the full basis, *i.e.*, including the quotas for the Jubilee Fund. Who will head the first such list? C. C. G.



ESPERANTA RADIOPROGRAMO—JULY, 1935.

Tago kaj dato.	Horo (B.S.T.)	Stacio.	Ond- longo. Metroj.	Pot- enco. Kv.	Pro- gramo.
Dimanĉo : 7, 14, 21, 28 ..	09.30–10.00 ..	Lille PTT ..	247	5	K
7, 14, 21, 28 ..	09.45–10.00 ..	Lyons-la-Doua ..	463	15	K
14, 28 ..	22.40–23.11 ..	Huizen ..	1875	20	P
Lundo : 1, 8, 15, 22, 29 ..	18.35–18.45 ..	Rome ..	420	50	I
